

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

N:o 8.
September 1913.

Redaktör:
R. PEHRSSON


Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspris 5 öre pr mm.

La 9-a Universala Espe- ranto-kongreso en Bern 1913.

Kelkaj spertoj kaj impresoj.

La 20-an de Aŭgusto ni svedaj esperantistoj, partoprenontoj en la Kongreso de Esperanto en Bern, forlasis la ĉefurbon. En la vespero la samideanoj kolektiĝis en la stacidomo por diri adiaŭ kaj deziri al ni feliĉan vojaĝon. Estis tri esperantistoj de Stockholm, kiuj forvojaĝis: fraŭlinoj Helmi Josefson kaj Anna Hemberg kaj subskribinto. Kvankam la vetero estis malbela, la esperantista humoro ne mankis. Ni sidis en la kupeo, Esperanto zumis, la lastajn salutojn ni interŝanĝis. Sed, ho ve! La tempo tiel rapide forfluegis kaj ni ne atentigis pri la minutoj. La vagonaro subite ekmoviĝas, pli kaj pli rapide iras. Eksteren! Eksteren! ni admonas la esperantistajn babilulojn. Tro malfacile! La pordoj jam estas fermitaj, kaj por savi sin kelkaj samideanoj devis salti tra la fenestro! Ĉio tamen iris bone kaj en vivkrioj por Esperanto ni ĝoje adiaŭis la esperantistojn sur la perono kaj forlasis Stockholm'on. En *Hessleholm* (Skåne) ni renkontis fraŭlinon Anna Jönsson, kiu ankaŭ partoprenus la kongreson en Bern. Ni do estis kvar svedaj esperantistoj, kiuj en akompano kune vojaĝis al Bern. Dum la vojaĝo ni kompreneble propagandis Esperanton kaj esperantigis la homojn. Alveninte al Berlin, ni renkontis germanan samideanon sur la perono, kiu nin atendis kaj helpis trovi bonan hotelon. En lia akompano ni vizitis



Bildo de la festa malferma kunsido de la kongreso.

la urbon kaj la Esperantan Societon »Mercur» en Berlin. Tre agrabla vizito! La venontan tagon matene ni forvojaĝis de Berlin al Bern.

En la sama vagono, kiel ni, sidis germanoj kaj ni komencis germane alparoli ilin pri Esperanto. Baldaŭ la tuta vagono legis kaj studis Esperanton. Mi eĉ poste en Bern ricevis karton, skribitan en *Esperanto* de fraŭlino, kiu sidis en tiu vagono kaj kies studon de nia kara lingvo mi helpis. Bela kaj bona propaganda sukceso, ĉu ne? Malkaŝe mi devas diri, ke la svedinoj bone propagandis kaj precipe gajnis per nia afero la — sinjorojn! Pardonon! En *Halle* mi diris »Ĝis la revido!» al miaj svedaj akompanantinoj, ĉar mi unue volis vojaĝi al *Stuttgart* por partopreni la germanan kongreson. Sed estis la unua eraro, kiun mi faris. Mia halto en *Stuttgart* ne estis tro agrabla. Laŭ la skribo mi estus trovinta ĉion en la

stacidomo. Sed la esperantista oficejo ne estis videbla kaj nenium afiŝon mi vidis. Post atendo mi subite ekvidis esperantan stelon sur surtuto. Mi alparolis lin, kiu portis la stelon, kaj en lia akompano ni do serĉus la esperantistan lokon. Sed tiu sinjoro verŝajne gustumis la germanan bieron aŭ vinon tro multe.

Iun pli strangan personon mi neniam renkontis. Ni kuris kiel frenezuloj sur la stratoj, »serĉante» la esperantistan lokon. Li ja ankaŭ estis partopreninta kongresano, kaj mi do pensis, ke li almenaŭ povus doni informon. Vane! Ni vagadis en la urbo, la tempo iris, fine mia germana »samideano» verŝajne trovis la iradon iom soifiga, ĉar li murmuretis ion, petis pardonon kaj forlasis min tute simple, Pang! Mi staris sola en la malluma vespero en la fremda urbo. Mi efektive admiris la bonan akceptan talenton

de la esperantistoj en Stuttgart! Fine mi trovis la domon de prof. Christaller. Li bedaŭrinde ne estis en sia ĉambro. Mi atendis ĝis noktomezo, poste mi foriris. Stuttgart estas tre vidinda urbo, kuŝas en valo tre pitoreske. En la stelplena nokto mi promenadis kaj trovis, kvankam laca post 59-hora vojaĝo, en Stuttgart multe da interesaj. La venontan tagon en la mateno mi iris al la stacidomo kaj trovis tie grandan amason esperantistan. Multe da *diverslandaj* esperantistoj tie kolektiĝis kaj per specialaj vagonoj ni forlasis Stuttgart'on por vojaĝi al Bern. Estis tre agrabla vojaĝo. Bela, belega natura pejzaĝo kaj ĉarma vetero. En *Zürich* la granda internacia karavano esperantista haltis 2 horojn. Gvidataj tre bone de samideanoj en *Zürich* ni havis la ĝojon konatiĝi kun tiu bela urbo kaj vidi la ĉefajn vidindaĵojn. Poste ni daŭrigis nian vojaĝon kaj alvenis al Bern je la 6:a horo vespere. Gvidantoj kun esperanta flago atendis nin ĉe la stacidomo. Tuj je la eliro el la stacidomo ni vidis grandan, elegantan portalon kun surskribo: *Kongreso de Esperanto*. La tuta urbo estis feste ornamita, esperantaj kaj diversnaciaj flagoj fortigis la agrablan unuan impreson de la kongresurbo.

Facile ni trovis la *Kazino'n*, kie la kongreso okazus kaj en kiu la akceptejoj, vendejo k. t. p. estis lokitaj. En la *Kazino* mi ricevis la dokumentojn, kongreslibrojn, la belan kongres-signon (el arĝento!) k. t. p. La loĝa komitato bone zorgis pri la loĝejoj kaj la kontento estis unuanima. En la dimanĉo la 24:an de Aŭgusto la kongresaj manifestadoj komencis. Jam matene okazis *dioservoj* en Esperanto. La protestanta dioservo de pastro Rust okazis en la bela preĝejo »Heilig-Geist«. La katolika, de abato Raici el Budapeŝt, en »Trinitatis« kaj la hebrea, farita de rabeno Saphra, en »sinagogo«. Posttagmeze dimanĉe je la 3:a horo okazis la *festa malferma kunsido* en la bela salonego de la *Kazino*. Imponanta, brila esperantista solenfesto. Post kantado de la himno, »La Espero«, ĥore kantata de la kongresanaro kaj majstre akompanata de s-ro orgeninspektoro *Locher*, la kunsido estis malfermata de generalo Sébert de Parizo. Sekvis la elekto de estraro, legado de telegramoj k. t. p. Multe da regnoj, publikaj administracioj kaj internaciaj asocioj estis sendintaj

oficialajn reprezentantojn, kiuj simpatie salutis la kongreson. La honora prezidanto de la kongreso, kolonelo *E. Frey*, bonvenigis la kongresanojn per bela parolado, dezirante al nia kongreso plenan sukceson. S-ro *Kritler*, reprezentanto de la *registaro* de la kanto, deziris bonvenon al la esperantistoj en la landon de la libereco. S-ro *Rollier* salutis la kongreson en la nomo de la oficejo por alprenado de lingvo internacia kaj akcentis la *gravecon de Esperanto*. Gratulinda konfeso! S-ro rektoro *Boirac* plenumis la sanktan, malĝojigan devon elvoki la memoron de la mortintaj kunbatalantoj, kaj por honori la memoron la ĉeestantaro levigis. Poste prof. *R. de Saussure* faris solenan paroladon, ofte aplaudatan. Sekvis longa vico de la alparoloj de diverslingvaj naciaj delegitoj. Kiel delegito de nia lando mi salutis la kongreson en la nomo de la svedaj esperantistoj. Rimarkinde estas, ke la ĉefo de la Bontemplana Internacia Asocio, s-ro *Edvard Wavrinsky* per reprezentanto simpatiege salutis la kongreson. Bela, impresiga momento estis la transdono de la *ora medalo* al D-ro *Zamenhof*. Post la kunveno ĉiuj kongresanoj, pluraj nacie vestitaj, kolektiĝis sub siaj respektivaj naciaj flagoj, kaj sekvante la urb-muzikistaron faris imponantan marŝadon tra la urbo. Multege da popolo ĉie, kie la esperantistoj trapasis. Reveninte al la *Kazino*, sur kies balkono D-ro *Zamenhof* sidis, ĉirkaŭataj de la estradaj eminentuloj k. a., la urba muzikistaro solene ludis la svisan nacian himnon. Fine la kongresanoj flame kaj entuziasme kantis »La Espero'n«, kiun la urb-muzikistaro talente akompanis. La oficiala parto de la unua kongresa tago estis finita per bela elektra lumigado de la *Katedralo*. Belega aspekto! —

Lunde komencis la fakkunsidoj en la *Universitato*, kunsido de U. E. A. en la *Kazino* k. t. p. La limigita spaco de »La Espero« ne permesas priskribon de la diversaj fakkunsidoj kaj de la tuta labora semajno de la kongreso. La interrezultoj trovas en aliaj gazetoj, precipe en »*Esperanto*«, detalajojn. Mi nur konklude volas diri, ke la kongreso kaj ĝia laboro estis nova pruvo pri la laboremezo kaj *praktika* iniciatemo de la esperantistoj.

* * *

Okaze de la kongreso estis nature ankaŭ multe da festoj kaj distraĵoj. Tre interesa kaj vidinda estis la prezentado en Esperanto de la teatraĵoj »*La Patreco*« kaj »*Ginevra*«. Precipe la prezentado de »*Ginevra*« fariĝis vera sukceso, dank' al la majstra ludado kaj eleganta aranĝo. Precipe la geaktoroj el la Reĝa Teatro en Antverpeno s-ino *Helene Bertrijn* kaj s-ro *Jules Verstraete* meritas grandan laŭdon pro la delikata kaj lerta ludado, kiu donis neforgeseblan, agrablan impreson kaj estos memoro por la tuta vivo. — Inter la *ekskursoj* mi citu speciale tiun al la montego *Jungfrau* kaj la urbo *Interlaken*. Dum la vojaĝo al kaj sur *Jungfrau* oni havis la plej bonan okazon vidi kaj admiri la belegan naturon de la svisaj alpoj. Proksime de »*Interlaken*« la kongresanoj havis okazon vidi la mondfaman prezentadon de *Vilhelm Tell* en la libraera teatro. Efektiva vidindaĵo! La teatraĵo estis prezentata germane. Por la honoro de la esperantistoj la aktoroj en kelkaj scenoj parolis en *Esperanto*. Granda aplaŭdo kaj entuziasmo! Ĉie Esperanto! Vespere estis en »*Interlaken*« granda festo por la esperantistoj en »*Kursaal*« kaj en la ĉirkaŭanta elegantega parko. La festo estis finata per unuaklasa brila fajraĵo. Neforgesebla! — Inter aliaj belaj festoj de la kongreso mi ne forgesu la *grandan koncerton*, donitan de la »*Berner Männerchor*« en la salonego de la *Kazino*, la *popolan svisan feston* sur la monto *Gurten*, kaj »*last but not least*«, la grandan *internacian balon* en naciaj kostumoj en la *Kazino*. Ĉio estis ja admirinda kaj unika en sia speco.

* * *

La 9:a Kongreso de Esperanto en Bern 1913 faris efektive grandan propagandon. Ĝi montris denove al la mondo, ke Esperanto vivas, floras kaj progresas en ĉiuj partoj de la terĝlobo. La unuan fojon en kongreso Esperanta mi nun ankaŭ havis la ĝojon paroli kun *negroj* en Esperanto. Estis tri negroj kaj unu negrino (tre ĉarma fraŭlino!), kiuj ĉeestis la kongreson. Ankaŭ malaja kaj multaj aliaj diversgentaj homoj ĉeestis. Tio estis nova pruvo pri la disvastiĝo de nia lingvo kaj montras tute klare, ke Esperanto enpenetras ĉien. Ĉie *Esperanto* trovas la vojon, kaj per sia verda brilanta stelo ĝi altiras al si pli kaj pli grandajn homamasojn, kiuj trovas en Esperanto netakseblan helpon por ĉiuj

celoj. En la kongresurbo mem, Bern, ni havis okazon vidi kian grandegan progreson ni jam faris kaj konstati la ĝojigajn signojn *de la fina venko*. Nia venonta X Universala Kongreso de Esperanto okazos la venontan jaron en Parizo. Ni iru al Parizo, la ĉefurbo de la mondo, en grandaj, grandaj amasoj, por tie doni *la lastan* frapon kaj glore konstati la definitivan venkon de Esperanto en la tuta mondo!

Teodor Rosengren.



Kurs

i Esperanto för nybörjare.

Femte lektionen. — Kvina leciono.

Översättning av övningsstycke III.

Fadern läser tidningen. Tidningen innehåller många nyheter. Icke alla nyheter äro goda. Varje esperantist bör prenumerera på en esperantisk tidning.

Karl skriver ett långt brev till farbrodern, men Maria skriver ett ännu längre brev till modern. Skriv alltid kort. På så sätt sparar du tid, och »tid är pengar».

Om (ifall) herr A. skulle komma, (så) säg honom, att jag genast skall komma. Hade jag (=om jag hade) pengar, skulle jag resa till Paris. Paris är den vackraste staden, ehuru London är större.

Possesiva pronomen.

Genom att lägga adjektivändelsen *-a* till de personliga pronomen (mi, vi o. s. v.) bildas deras ägandeform, de s. k. possessiva pronomen:

Mi, jag	mia, min
vi, du	via, din
li, han	lia, hans
ŝi, hon	ŝia, hennes
ĝi, den	ĝia, dess
ni, vi	nia, vår
vi, ni	via, eder
ili, de	ilia, deras.

Räkneord.

Grundtal. *Ordningsstal.*

1, unu	unu'a, första
2, du	du'a, andra
3, tri	tri'a, tredje
4, kvar	kvar'a, fjärde
5, kvin	kvin'a, femte

6, ses	ses'a, sjette
7, sep	sep'a, sjunde
8, ok	ok'a, åttonde
9, naŭ	naŭ'a, nionde
10, dek	dek'a, tionde
11, dek-unu	dek-unu'a, elfte
12, dek-du	dek-du'a, tolfte
20, du-dek	du-dek'a, tjugonde
21, du-dek-unu	du-dek-unu'a, tjuguförsta
30, tri-dek	tri-dek'a, tretti-onde
99, naŭ-dek-naŭ	naŭ-dek-naŭ'a, nit-tionde
100, cent	cent'a, hundrade
101, cent-unu	cent-unu'a, hundraförsta.

Grundtalen böjas icke; ordningstalen böjas såsom adjektiven och kunna således få flertals- och akkusativändelserna. Genom att foga ändelserna *-o* och *-e* till grundtalen får man deras substantiv- och adverbformer. Ex. *unu'o*, ental, etta; *tri'o*, (en) »trio», tretal; *dek-du'o*, dussin; *du-dek'o*, tjog; *unu'e*, först, för det första; *du'e*, för det andra; *tri'e*, för det tredje o. s. v.

Bråktal bildas genom stavelsen *-on'*: *du'on'o*, (en) hälft; *du'on'a*, halv; *tri'on'o*, (en) tredjedel; *tri'on'a*, tredjedels; *dek'on'o*, (en) tiondedel; *dek'on'a*, tiondedels.

Mångfaldighetstalen fås genom att foga ändelsen *-obl'* till grundtalen: *du'obl'a*, tvåfaldig, dubbel; *tri'obl'a*, trefaldig; *du-dek'obl'a*, tjugufaldig.

Samlingstalen betecknas genom ändelsen *-op'*: *du'op'e*, två och två, två »i stöten»; *kvin'op'e*, fem och fem, fem i stöten.

Ordbildning.

Förstavelsen *ge-* framför ett ord betecknar en sammanfattning av båda könen, t. ex. av *patr'o*, fader, (*patr'in'o*, moder) fås *ge'patroj*, föräldrar; *reĝ'o*, kung, (*reĝ'in'o*, drottning), *ge'reĝoj*, kungapar.

Efterstavelsen *-an'* betecknar medlem, invånare, anhängare o. d.: *Stockholm'an'o*, stockholmare; *London'an'o*, Londonbo; *krist'an'o*, kristen; *luter'an'o*, luteran; *sam'ide'an'o*, (ano de sama ideo), anhängare av samma idé; meningfrände.

Övningsstycke IV.

Via patro kaj mia patrino estas gefratoj. Liaj gepatroj estas tre afablaj gemaljunuloj. Vi devas viziti ilian hejmon, kiam vi venas al nia urbo.

La geedzoj havas tri infanojn, unu filon kaj du filinojn. La filo estas plej juna; lia nomo estas Karlo. Lia plej maljuna fratino estas Mario; ŝi estas dudekjara. Lia pli juna fratino estas dek-ok-jara; ŝia nomo estas Elizo. Karlo mem naskiĝis la dudektrian de oktobro en la jaro mil naŭcent-naŭ-dek-ok; li do estas nun dek-kvin-jara.

Estas necese, ke oni lernu la akuzativan formon precize. Ne nur substantivo kaj adjektivo povas havi *n*-formon, sed ankaŭ la pronomoj. Ekzemple: Mi amas vin. Oni devas honori siajn gepatrojn.

Ordlista.

frat'o, broder.	neces'a, nödvändig
afabl'a, vänlig,	estas necese, det
snäll.	är nödvändigt.
vizit'i, besöka.	oni, man.
hejm'o, hem.	lern'i, lära sig.
kiam, när	akuzativ'o, akku-
edz'o, make (äkta	sativ.
man).	form'o, form.
infan'o, barn.	preciz'a, precis.
fil'o, son.	hav'i, hava.
nom'o, namn.	pronom'o, prono-
jar'o, år.	men.
naskiĝ'i, födas.	ekzempl'e, t. ex.
oktobr'o, oktober.	am'i, älska.
do, då, således.	honor'i, hedra.



Sveda kroniko.

Gotenburgo. — Okaze de la flugado de s-ro Chevilliard en Gotenburgo skribas al ni la sekretario de la Gotenburga klubo, s-ro C. Ohlsson:

— En tiuj ĉi tagoj de aerflugada intereso mi havas saluton al la sveda esperantistaro por transdoni.

Je la vizito ĉi-tie la 14-an de tiu ĉi monato de la fama fluganto s-ro Chevilliard mi, kiel jurnalisto, havis la plezuron pasigi kelkajn horojn kune kun s-ro Chevilliard ĉe la lunĉo, kiun direktoro Petersen el Lorensberg donis al li post la alveno antaŭ la posttagmezaĵ flugoj. Sciante ke Henry Farman, kies maŝinon Chevilliard uzas kaj en kies servo li estas, apartenas al nia samideanaro, mi demandis la famulon, ĉu li estas esperantisto. Persone ne, li diris, sed Farman estas. Kaj li skribis — france — karton al Farman, kiun li petis min subskribi en Esperanto. Vi ankaŭ devas skribi Esperante al Archdeacon, li daŭrigis, kaj Che-

villiard afable subskribis mian en-Esperantan karton al Archdeacon. Sed ĉar mi ne havis lian adreson, ni skribis laŭ la adreso de Farman. Antaŭ kelkaj tagoj — samtempe je la sciigo pri la akcidento trafinta Farman — mi ricevis poŝtkarton kun la bildo de Ernest Archdeacon kaj la jenaj vortoj:

»Plej korajn dankojn, kara samideano, pro via afablega saluto, kion mi kore resendas al vi, kaj al ĉiuj svedaj samideanoj.»

Ernest Archdeacon.

Gävle. — Kiam nun la aŭtuno venis, ankaŭ la ĉi-tiea klubo komencas fariĝi pli vigla. La 22-an de septembro la klubo aranĝis paroladon en la ejo de la laborista instituto. La parolado, kiu traktis pri la utilo de internacia lingvo kaj estis farita de kolegia adjunkto E. Beckman, tamen nur povis kolekti bedaŭrinde kaj mirinde malmulte da aŭskultantoj.

Jaŭdon la 25-an de septembro komenciĝis nova kurso, gvidata de s-ro Beckman. La partoprenantoj montras viglan intereson kaj studemon, kiu promesas bonan rezultaton. — Dume la pli lertaj membroj de la klubo deŝtorkas kelka tempo kolektiĝas ĝis »konversaciaj vesperoj» en ia kafejo, por ekzerciĝi en parolado de nia lingvo kaj samtempe fari ion da propagando.



Kanto

el sveda lingvo tradukis Teo.

Jen kantis belaj knabinoj nun trans barilo.

Kaj ruze venis amdio mem tra barilo.

Jen venis ĝi ĉirkaŭvidante kaj aŭdis birdojn en ĉiuj arboj, aŭdante pepon en ĉiuj gutoj dum vesperbrilo sur foliar'.

Ĝi sagon kaptis el sub flugilo kaj rondon pafis en verdarbar'.

Ĉu trafis sag'?

Neniu scias,
neniu scias.

Esperanto kaj lernejo.

La tempo rapidas kaj la evoluado iras, spite de ĉio, tamen antaŭen. Ankaŭ en Svedujo Esperanto jam frapas al la pordoj de la lernejoj kaj postulas sian lokon sur la instrua plano. Pro tio mi volas uzi la okazon por diri kelke da vortoj pri tiu temo. Ĉiuj ja scias, ke la lasta kongreso de la Sveda Esperantista Federacio elektis komitaton por ellabori proponon pri *ŝtata subvencio* al la turista agado de la svedaj esperantistoj kaj por *enkonduko de Esperanto en la lernejojn*, precipe do la popollernejojn.

Tiu komitato, en kiu la subskribinto ankaŭ estas membro, laboras energie kaj metode en la ĉefurbo. Sed dum ni atendas la rezultaton de la komitata laboro, ni esperantistoj devas bone uzi la tempon kaj kiel eble plej multe helpi al la sukceso de la gravega entrepreno de la komitato. Estas ja tute komprenebla afero, ke ni unue devas havi *esperantistajn* instruistojn antaŭ ol oni povas enkonduki Esperanton en la lernejojn. Se mankas instruistoj de Esperanto, do ankaŭ nia lingvo neniam povos esti instruata en la lernejo kiel deviga aŭ fakultativa fako. Unue ni devas havi instruistojn por nia lingvo, kaj poste la instruado de Esperanto en la diversaj lernejoj sekvos de si mem, fariĝas nature konsekvenco. Do mi direktas en la nomo de la komitato peton al ĉiuj esperantistoj de nia lando, ke ili de nun kiel eble plej energie klopodu por *interesigi la instruistojn* por Esperanto kaj enskribu ilin kiel membrojn en la klubojn. Precipe ni klopodu por varbi la *popolinstruistojn* kaj esperantigi ilin. Kiel ĉiu lingvo ankaŭ Esperanto bezonas efektivajn instruistojn, pedagogojn.

Kiam la popolinstruistoj, profesoroj kaj aliaj instruistoj fariĝis *esperantistoj*, tiam oni ankaŭ en la realeco *enkondukis Esperanton en la lernejojn*. Ni komprenu tion kaj de nun ni eklaboru kaj turnu nian forton al tiu direkto, por ke niaj malamikoj de ĉiuj koloroj vidu la disvastiĝon de nia lingvo en la lernejoj kaj sentu la bonan odoron de la florado de Esperanto!

Teodor Rosengren.



Aventuro de fiskgardisto.

La historio registras multajn tre strangajn kaj kuriozajn okazojn de antipatio. Tiajn sentojn de natura kaj nekomprenebla antipatio havis la plej fame konataj homoj. Ĝi estas antipatio de kato al muso, de hundo al kato, k. t. p.

Tycho-Brahe sentis siajn kruojn fleksiĝi kiam li renkontis leporon aŭ vulpon. Erasmo ne toleris fiŝodoron, ĉar ĝi kaŭzis al li febron. Henriko III.^a ne povis resti sola en ĉambro, kie troviĝas kato. Marŝalo de Albret ne sentis sin bone dum festeno en kiu aperis kuirita porkido. Ladislaŭ, reĝo de Polujo, ne povis rigardi akvon. Mario de Medicis ne toleris rozojn eĉ pentritajn. La ŝtelistoj malamas la policistojn, k. t. p., k. t. p.

Paschoal, sub-serĝento, havis la plej profundan abomenon al alkoholo, kia ajn estus la nomo per kiu ĝi kaŝiĝus: konjako, rumo, juniperbrando, absinto, k. t. p.

La kaŭzo de tio devenas de terura aventuro, aventuro el tiuj, kiuj treunigas la plej kuraĝajn bravulojn.

Kiam li ekvidas kalikon da alkoholo, li naŭzas, kaj tamen iam li tre ŝatis la fluidaĵon nun tiel malbenatan.

Ĝi okazis en la tago kiam Paschoal deĵoris ĉe fervoja stacidomo.

Paschoal estis tre ruza, movis ĉiujn pakajojn kaj neniu fanfaronis kaŝe esti pasiginta ian ajon, kiu devus esti submetita al dogana impostpago.

Tuj kiam alvenis la vagonaro li demandis ĉiujn pasaĝerojn, precipe la virinojn. Foje virino kunportis malgrandan saketon.

— »Kion vi enportas tie?»

— Nenion, sinjoro.

— Nenian botelon da alkoholo, porkajon . . .

— Ho, sinjoro, botelon en saketo tiel malgranda.

— Nu, iru.

Ĉiufoje li malfermis la frukt-kaj fiŝ-vendistinajn korbajn, atente ekzamenis ĉion kaj eĉ sentis plezuron vidigi aĵojn de uzado pli intima: frizilojn, harligajojn, perukojn, k. t. p.

Ian tagon vojaĝanto alportis zinkskatolegon je du metroj longan kaj valizon, kiun li metis sur la tablon.

— »Ĉu vi alportas ion, kio devas esti submetita al impostpago?» demandis Paschoal.

— Ne, sinjoro. En la valizo mi havas nur tolaĵojn kaj la skatolego restas ĉi tie ĝis kiam mi venos morgaŭ por ĝin forporti.

— Iru, diris la serĝento, farinte per kreto skribaĉon sur la valizon de la vojaĝanto

Kiam ĉiuj pasaĝeroj jam estis foririntaj, Paschoal kune kun iuj samprofesianoj ekrigardis la skatolegon, kiu ŝajnis al li suspekta.

— »Hm! Ĉi tie estas trompaĵo», li diris, frapante ĝin. Samtempe du gardistoj levis kaj skuis ĝin konstatante ke interne troviĝas fluidaĵo.

— »Kredeble ne estas akvo», diris Paschoal.

— »Certe», respondis la alia.

— »Ni kontrolu».

Per borilo ili faris truon tra kiu ili enigis internen sondilon kaj flaris.

— »Sendube ĝi estas alkoholo».

— »Bonega alkoholo, diris Paschoal, ĝi agrable bonodoras. Alportu kalikojn.

Tuje gardisto rapidis al kantino kaj plenumis la ordonon.

Per kaŭĉuka tubo ili elĉerpis ion da fluidaĵo. Ĉiuj trinkis. Tamen unu rimarkigis malbonan guston.

Paschoal respondis:

— »Mi neniam trinkis ion tiel bongustan». Kaj ree plenigis la kalikon.

Sekvintan tagon la pasaĝero sin prezentis por repreni la skatolegon. Paschoal jam atendis lin.

— Ĉu tie troviĝas io pro kio vi devas pagi imposton?» li demandis.

La vojaĝanto malgaja kaj sopire nee respondis kaj malkaŝe diris, ke en internaĵo de tiu skatolego troviĝas kadavro de lia frato nelonge mortinta, kaj kiu testamente deziresprimis esti enterigota en sia naskiĝloka tombejo.

— Kara sinjoro, vi ne sukcesos min trompi, diris Paschoal. Tio estas rusajo jam de longe uzita de la malnovaj kontrabandistoj intence kaŝi alkoholon pro la dogana impostpago.

— »Alkoholo! diris la vojaĝanto; kiamaniere vi tion sciis?

— »Mi ĝin gustumis . . .

— Kion vi diras?!

— Mi tion faris nur por taksii ĝin gradon.


— Kion vi faris! diris la vojaĝanto malferminte la kovrilon de la skatolego, kie surnaĝis sur alkoholo homa kadavro.

En ĉeesto de tiu naŭziga spektaklo Paschoal svenis. La gardistoj naŭze ekvomis kaj forkuris en ĉiujn direktojn.

De tiu tago la serĝento neniam plu povis rigardi alkoholon, sentante ĉiam naŭzon tiel same, kiel okazas kiam oni naŭzas dum marvojaĝado.

Tradukis: »*Arkosano*».

(Portugala Revuo.)



Pri hundo.

De Hasse Z.

Okaze ni ekparolis pri hundoj — s-ro Svensson dum la antaŭtagmezo aĉetis tian beston, kiu la tutan tempon, kuŝante sub la tablo, lekadis la ciron de niaj 23-spesmilaj ŝuoj — kiam s-ro Olsson diris:

— Mi memoras viron, kiu dum dek jaroj vivis per sia hundo.

— Ĉu li faris kolbasojn aŭ komanditan kompanion el ĝi? demandis Svensson.

— Ne, diris Olsson, la viro transloĝis en havenurbon, kaj tuj kiam vojaĝanto alvenis al la urbo — tio okazis unu fojon ĉiusemajne — li vendis ĝin al tiu por 10 Sm. La vojaĝanto prenis ĝin kun si sur la ŝipon, pensante, ke li nun ekhavis agrablan akompanulon por la tuta vivo. Sed kiam ekiris la boato, la viro staris sur la bordo kaj fajfis al sia hundo, kiu kompateme ridetante saltis de la ŝipo kaj naĝis al la bordo. Tiel la viro gajnis 40 Sm. ĉiumonate.

— Nu, kiel finis? diris Jonsson.

— Jes, unu fojon la hundo estis vendata al vojaĝanta anglo, kiu, aŭdinte pri ĝi, vojaĝis per ekstra vagonaro el Orienta Hindujo nur por vidi la hundon.

Li pagis por ĝi kontante kaj prenis ĝin kun si sur la boaton, kie li donis al la tuta ŝipistaro 100 funtojn kaj du botelojn da viskio, por ke ili ligu la beston per la ankra ferĉeno en la ŝipantaŭo.

La hundo rezignis, ridetante kiel ordinare. La ŝipo ekveturis kaj la viro staris sur la kajo kaj fajfis kiel kutime la spegularion el Lohengrin — la solan melodion, kiun la hundo, dankon al Dio, konis.

La anglo tremis pro eksciteco, la ŝipestro kriis al la maŝinisto: malrapide antaŭen! — kaj la hundo saltis trans la barilon. Ĝi malaperis sub la akvon, revenis supren kaj komencis naĝi al la bordo. La ŝipestro dum dek minutoj tiom blasfemis kiom alie dum unu monato, kaj la anglon oni devis ruli

inter malsekaj littukoj por repulsigi al li la sangon.

La hundo tiris la boaton sur la bordon, svingis la voston je sia mastro, kiu malligis ĝin de la ĉenego, kaj manĝis poste sian ordinaran porcion da bubala viando.

— Ĉu vi finis nun? ni diris ĉiuj kun indignaj mienoj,

— Ne, diris Olsson, tuj kiam la anglo konsciiĝis, li elskribis ĉekon je 1000 funtoj sterlingaj, aĉetante la hundon, kaj tiu hundo poste tiris dum multaj jaroj ŝtonkarbopramojn inter London kaj Southampton.

Tradukis R. P—n.



R. Fegraeus.

Ankaŭ en nia lando la morto forprenis unu el la plej sindonaj kaj fervoraj batalantoj por nia ideo; el Gotenburgo sendas al ni s-ro Carl Ohlsson, sekretario de la tiea klubo, la tiel malĝojigan kiel neatenditan sciigon pri la morto de s-ro Reinhold Fegraeus, kasisto de la klubo. Li skribas:

»Mi havas la dolorplenan devon sciigi, ke nia klubo, antaŭ nelonge perdinte, feliĉe nur pro forvojaĝo, sian unuan prezidinton, s-ron J. Huysmans, nun ankaŭ perdis sian kasiston, s-ron Reinhold Fegraeus, kiu hodiaŭ antaŭtagmeze — la 26-an de aŭgusto — mortis, nur 28-jara.

En tre viva rememoro staras al mi, kiel — antaŭ ok jaroj — iu post kunveno de bontemplana loĝio promesis prezenti min al esperantisto, s-ro Fegraeus; mi estis tiam tute sola kiel tia. Depost tiu tempo ni ĉiam amike interrilatiĝadis, kaj la vesperon antaŭ lia ekmalsaniĝo ni kune okupigis je iu »esperanta afero», volante grandajn projektojn pri la disvastigo de nia lingvo kaj la ideo karaj al ni ambaŭ. La lastan dimanĉon, post operacio je l'apendicito farita la antaŭan tagon, mi vizitis lin en la malsanulejo. Neniu tiam eĉ ekpensetis pri morto. Ni interŝanĝis, kiel ĉiam, unu »ĝis revido!» kaj mi aldonis: »En alia loko ol ĉi-tie.» La sorto volis ion alian, kaj ni — kiel ankaŭ lia granda amikaro inter bontemplanoj, skoltoj kaj aliaj — perdis fervoran samideanon kaj bonan simpatian kamaradon, mi persone amikon, kies »Bonan tagon» mi ne plu aŭdados.»

Carl Ohlsson.

La maljuna bovo.

Rakonto de Elin-Pelin.

El la bulgara lingvo tradukis Georgi Fandikov.

Inter miaj memoroj el la infanaĝo — jen pri mia naskiĝvilaĝo kun ĝia larĝa horizonto, kiu etendiĝas kiel kvietaj bildoj, superŝutita je radioj de la suno, jen pri nia rapidflua rivereto kaj pri la vilaĝaj kampoj, kie mi kolektis florojn kune kun la malgranda Katja — aperas la granda osta figuro de Belĉo, nia maljuna bovo.

Ĝi trenis la plugilon dum multaj jaroj, obee kaj kun la granda sereneco de bova animo; ĝi estis jam maljuna kaj kaduka. Mia patro, kiu elnutris ĝin el malgranda bovido, sentis malseverecon al tiu ĉi maljuna helpanto, lia amiko; li sciis ĝian tutan vivon, memorante nenion malbonan pri ĝi; li ĝin amis kaj ne volis ĝin vendi, ne volis plu ĝin turmenti, kaj lasis al ĝi vivi libere kaj facile dum la maljuneco.

La malriĉa Belĉo! Kian martiran aspekton ĝi havis, kaj kian kvietan animon! Ĝi estis la plej granda besto en la vilaĝo, tute blanka, kun grandaj pintaj kornoj, kubaj kvazaŭ liro super ĝia frunto. Ĝi kuŝis en la korto sub la ŝirmtegmento, ĉirkaŭita de la zorgoj de la infanoj. Ni ĝin kombis, karesis, iam ni ligis florojn sur ĝiajn kornojn. Ĝi nin rigardis trankvile per siaj grandaj nigraj okuloj, tiom karaĵ, saĝaj kaj kompataj ke ŝajnis al ni, ke ĝi volas diri ion al ni, kaj ni nevole enrigardadis en ĝiaj okuloj, eksilentis kaj atendis. Ĝi maĉis trankvile per sia jam sendenta buŝo kaj rigardis nin ĉiam tiel melankolie.

Ni konstante donadis al ĝi nutraĵojn, kaj ĝi ĉiam manĝis kaj maĉis, sed malgraŭ tio ĝi estis kaduka kaj povis neniam sin nutri. Kiam ĉiumatene ĝi stariĝis, purigis sin de pajleroj, lekis sin kaj fine eliris el sub la ŝirmtegmento irante al la rivero por trinki akvon, la homoj haltis por ĝin rigardi. Unuj mokis ĝin, aliaj estimis, triaj bedaŭris, kaj ĝi mem iris sur la vojo malrapide, trankvile, indifere, tenante sian kapon fiere kvazaŭ ĝi konsciis kion da klopodoj ĝi estas lasinta post si.

Kaj kun siaj malgrasaj koksoj, jam rimarkeblaj ripoj, belegaj kornoj sur kiuj pendis niaj floroj, kun la pureco de siaj haroj kaj la malrapideco de sia irado ĝi estis majesta.

Tiel ĝi iris ĝis la rivero, trinkis akvon, kaj tiel ĝi trankvila, ne rigardante flanken, revenis al la loko sub la ŝirmtegmento.

Ĝi neniam eraris pri la horoj por tiuj ĉi malgrandaj promenadoj. Ili okazis ĉiuvespere kaj ĉiumatene je la duono post la sesa, kaj la homoj per ili mezuris la tempon kiel per horloĝo.

* * *

Somere ni ĝin sendis kun la vilaĝaj brutoj al la paŝtejo, sed ĉar ili vagis malproksimen en la arbaro kaj surrampis sur la montojn, tio estis malfacile al ĝi. Iun tagon ĝi ne revenis. Mia patro prenis la pafilon kaj iris por serĉi Belĉon en la arbaro, kaj mi mem ploris tutan vesperon.

Tiu ĉi okazo igis nin sendi Belĉon jam ne kun la brutoj, sed kun la bovidoj. Ili ne iris malproksimen, ne eniĝis en la arbarojn, kaj por ĝi ne estis danĝere resti kun ili.

La unuan tagon ĝi revenis. La ambicio de tiu ĉi laboremulo estis ofendita, ĉar oni sendis ĝin kun la malsaĝaj bovidoj. La duan tagon ĝi iris, sed tagmeze ĝi revenis. Eble ie sur la paŝtejo ĝi estis ofendita de la bovidoj per iliaj torditaj vosto kaj senspritaĵoj. La trian tagon ĝi jam kutimiĝis, kaj la homoj amasiĝis por rigardi kiel ĝi ekiras. Ĝi ne iris inter la bovidoj, sed flanke, kvazaŭ instruisto apud la infanoj, kaj iafoje ĝi turnis sin al iu maltrankvila bovido aŭ montris siajn akrajn kornojn.

Frue en la mateno, kiam Belĉo aŭdis la voĉon de la paŝtisto, ĝi eliris el la pordo kaj haltis ĉe la vilaĝa limo, direktante la rigardon al la verda kamparo, super kiu la unuaj sunradioj apenaŭ ŝveligis la gutetojn de la roso. De tie ĝi rigardis la grenkampojn, kiuĵn ĝi sulkigis, la herbejojn kie ĝi estis laborinta kaj kie ĝi ankaŭ paŝtis kiam ĝi estis juna kaj forta.

Ho, kio aperis en tiu ĉi silenta animo!

* * *

En printempo, en aprilo, Belĉo malsaniĝis. Ĝi ne eliris por rigardi la kamparon, sed restis sub la ŝirmtegmento. Ĝiaj haroj hirtiĝis, la korpo tremis, la okuloj malsane rigardis, kaj nun oni povis legi en ili enuon. Ni kovris ĝin, donis al ĝi nutraĵojn, sed ĝi ne etendis sin al ĝi; ni donis al ĝi akvon — ĝi trempis la lipojn, turnis la kapon, kaj ĝemis kiel homo. Ni rapide alvokis la vilaĝan huforĝiston, kiu

sciis kuraci. Li ĝin atente observis, prenis ĝian voston, la orelojn, turnis ĝiajn palpebrojn, kaj fine blovis per tubeto ian nigran pulvoron en ĝian nazon, kaj lasis ĝin.

Kvar tagojn Belĉo kuŝis suferante kaj ruiniĝinte, ne rigardante la nutraĵojn, nek la akvon, kiun ni alportis al ĝi. En la kvina tago ĝi komencis manĝi, kaj stariĝis sur siaj piedoj. Ĝi estis tre malforta, kaj ĝia korpo estis plata kiel tabulo.

Estis bela printempa tago. Estis festo. La homoj revenis de la preĝejo bone vestitaj kaj gajaj. Sur la strato aŭdiĝis laŭtaj junaj voĉoj kaj fraŭlinaj ridoj. La prunarboj floris en la ĝardenoj. Dum la nokto estis pluvo, nun la aero estis freŝa kaj la ĉielo pura. La suno estis brila, bela kaj festa, kvazaŭ ankaŭ ĝi estis veninta el la preĝejo kune kun tiuj ĉi karaĵ homoj.

Belĉo estis elirinta sur la korton la unuan fojon post sia malsaniĝo, kaj maĉis en la sunbrilo. Hodiaŭ ĝi aspektis pli bone. Ni infanoj ĝojis pro ĝia resaniĝo, ankoraŭ unufoje ni ligis grandajn florojn sur ĝiajn kornojn, kaj kombis ĝin per granda fera kombilo. Tio faris al ĝi plezuron, kaj ĝi kontente palpebrumis kontraŭ la suno.

Kaj jen ĝi malrapide iris al la flanko, kaj eliris tra la pordego, majeste kiel ĉiam, nur malpli forta, kaj oni povis vidi, ke ĝi faletas ĉe ĉiu paŝo. Ni volis haltigi ĝin, sed nia patrino diris, ke ni lasu ĝin promeni. Ni ekiris post ĝi.

Ĝi direktiĝis sur la vojo al la rivero. La homoj, kiuj ne vidis ĝin dum ia tempo, haltis kaj diris: Kompatinda Belĉo!

Tiel ĝi iris, trinkis akvon, staris longe, kaj poste ĝi ne reiris hejmen kiel ĉiam antaŭe, sed iris al la proksima grenkampo, kie ondis alta sekalo, kie kriis koturno kaj flirtis malgrandaj papilioj. Ĝi haltis apud la kampo, rigardis ĝin kiel ion konatan, lekis, deŝiris kelkajn herberojn de la kamprando, ŝanceliĝis kaj falis subite. Tremantaj pro timo ni plorante kuris al la hejmo por rakonti.

Kiam ni revenis kune kun nia patro, Belĉo kuŝis mortinta apud la grenkampo, kun la kapo etendita sur fasko da floroj, kun la okuloj larĝe malfermitaj al la blua ĉielo, ankoraŭ tiel serenaj, trankvilaj, belaj kaj amikaj.

Tiam la unuan fojon mi vidis mian patron plorantan.

Tie apud la grenkampo, kiun ĝi iam plugis kaj kien ĝi venis por

meti sian lacan kapon, tie ni enterigis ĝin kiel homon en profunda tombo, la maljunan bovon. La loko estas ĉirkaŭita de blankaj ŝtonoj kaj sur ĝi kreskas luksa herbo.

Tiun ĉi lokon oni nomas Belĉa tombo.

Kaj ĉiam, kiam mi vizitas mian vilaĝon, mi ne forgesas riverenci ĉe du karaj tomboj — tiu de mia patrino kaj la Belĉa.

La manuskripto de tiu ĉi bela traduko mi antaŭ unu jaro ricevis de tre ŝatata amiko en Sofio. Kelke da semajnoj post tio mi sciigis ke li, kiel soldato, formarsiis al Burgas.

La rakonto cetere ŝajnas esti valora specimeno el la juna, malmulte konata literaturo de interesa kaj kulturema, sed malgranda kaj bedaŭrinda nacio.

Jln.



Abato Richardson.

La modestema ĉefo de la internacia katolika esperantomovado mortis la 20-an de aŭgusto en Bossey apud Genève.

Je Abato Richardson nia lingvo perdis junanime ageman pioniron, kaj la esperantista mondo perdis saĝan, ĉiam serveman, de ĉiuj amatan kaj respektatan, karbonan samideanon. Lia sano dum la lastaj jaroj ne estis forta, kaj nun ni kun rezigno devis ricevi la jam kelkfoje atenditan funebran sciigon. Sed la perdo, kiun nia afero suferis, estas grava, kaj la doloro de tiuj, kiuj persone konis lin, ne estas malpli maldolĉa kvankam ĝi estis atendata.

Austin Francis Richardson naskiĝis sur Ceylon la 21-an de oktobro 1843. Lia patro, arma kuracisto, mortis nelonge post tio kaj lia patrino (el la sveda familio Boije af Gennäs) reiris Anglujon kun siaj du malgrandaj infanoj. Ĉe aĝo iom pli ol dudekjara li aliĝis al la katolika eklezio kaj fariĝis pastro en ĝi. Tie ĉi, en gazeto nepre neŭtrala rilate al religio, ne estas la ĝusta loko por esplori liajn motivojn por lasi la anglikanan eklezion. Sed ŝajnas, ke unu el la karakterizaj trajtoj de lia tuta vivo estis lia arda entuziasmo por forigi tion, kio malunu-

igas la homaron. »Agu prave, okazu kio ajn», estis lia devizo, kaj konsekvence li prenis sur sin tion, kion li opiniis kiel devon. Tial, kiam li ekkonis la internacian helplingvon, li fariĝis ĝia fervora adepto, kaj iom pli malfrue kiam influhava antaŭa esperantisto en Belgujo (kie Abato Richardson havis sian agadon dum la lasta periodo de sia vivo) komencis kontraŭbatali la helplingvan ideon, Abato Richardson — la ĝusta viro en la ĝusta momento — senhezite fariĝis defendanto de la nepra unueco de la internacia helplingvo.

Kiam la belgaj esperantistoj restis fidelaj, tio estis ja parte kaŭzata de la pliboneco de Esperanto kompare kun diversaj elpenseblaj ŝanĝopropoj, sed al Abato Richardson certe apartenas iom da merito, ke tiu atenco kontraŭ la homara progresado fariĝis granda fiasko.

Ĉe la grava kunveno en novembro 1908, kiam Amatus van der Biest (nun ankaŭ mortinta) estis elektata kiel prezidanto de la Belga Ligo Esperantista, Abato Richardson fariĝis unu el ĝiaj du vicprezidantoj. Krom la funkcioj en la katolika kaj en la Belglanda organizaĵoj, li ankaŭ plenumis la oficon kiel U. E. A.-delegito en Bruxelles.

Rigardanto.



Ricevitaj gazetoj.

Foljande Esperantotidningar ha kommit redaktionen tillhanda:

»*Finna Esperantisto*», officiellt, monatligt organ för Finlands Esperantoförbundet. Red.: A. Sandström, 11 Köpmangat Helsingfors, *Finland*. Prenumerationspris 1: 20 Sm. (2: 20 kr.)

»*Arbeider Esperantist*», officiellt organ för nederländska Arbetare-Esperantoförbundet. Red.: W. Nutters, Ostadestraat 94, Amsterdam, *Holland*. Prenumerationspris 0: 40 Sm. (0: 75 kr.)

»*Oficiala Gazeto Esperantista*», organ för »Lingva Komitato», för kongressernas ständiga kommitté

Samideanoj!
Abonu "La Espero"

LÄKEROL

Bröst-Tabletten.

Välkänd för sin friska, goda smak.
Förordad af sanatorieläkare.
Rekommenderad af flera operasångare.
Berömd af furstliga personer.
Populär bland allmänheten.
Säljes öfverallt å 30 öre pr ask.

Thermos-Flaskor 2:50

Lösa glas 1:25

hos

A.-B. Axel Karlstrand

Rikst. 12 27

GEFLE

Rikst. 12 27

och för esperantistiska centralbyrån.
Red.: 51, rue de Clichy, Paris, *Frankrike*. Prenumerationspris 5 frs. (3: 60 kr.)

»*Sciencia Gazeto*», internationell tidskrift för vetenskap och industri, officiellt organ för esperantisternas internationella vetenskapliga förbund Adm.: Hachette & Co, 79, Boulevard St-Germain, Paris, *Frankrike*. Prenumerationspris 3 Sm (5: 50 kr.)

»*Le Monde Esperantiste*». Red.: 3, rue Sophie-Germain, Paris, *Frankrike*. Prenumerationspris 0: 80 Sm. (1: 45 kr.)

»*La Verda Espero*», Utgiven av »Konversacia Klubo de Aarhus, *Danmark*.

»*El Esperantista*», organ för Spanska Esperantoförbundet. Red.: Batalla del Salado, 60, Madrid, *Spanien*. Prenumerationspris 5 frs. (3: 60 kr.)

»*La Voĉo de l' Popolo*», kinesisk och esperantisk veckotidning. Red.: Sifo, 8, Chuu-Sin Tung Str., Sai-Kwain, Kanton, *Kina*. Prenumerationspris 2: 50 Sm. (4: 55 kr.)



Korespondado.

Anonceto pri korespondado kostas nur 0,50 kr. (2 respondekuponoj).

Nied a/ M. (Germanujo). — 8-ro Adolfo Kaiser, Beunestr. 25, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj. P. M. bildflanke.

☼ **HERRAR** ☼

ekipera sig bäst och fullständigast hos

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 - - GEFLE

Josef Wikströms

Tobakshandel

GEVALIAPALATSET - GEFLE

Kafé Linnéa

(Nykterhetsvännernas Kafé)

NYGATAN 34 - (Pousettska huset)

■ TELEFON 859 ■

Frukostar, Middagar och Soupéer.
Smörgåsar, Kaffe, The o. Choklad m. m.
Beställningar för mindre sällskap.

LOVISA HÖRLIN.

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSAFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

.....

Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

.....

RIKSTELEFON 16 97.

W. WAHLUND

Pappersvaror och skrivmateriel

RIKSTELEFON 17 23 ■ GEFLE

Carl Larssons

FOTOGRAFIATELIER

NYGATAN 34

Rekommenderas!

TELEFON 357

Läroböcker i Esperanto.

Kurs i Esperanto av *G. H. Backman*,
25 öre.

Lärobok i Esperanto, med Esp.-svensk
ordbok av *P. Nylén*, 1: — kr.

Erhållas hos **La Esperos redaktion**,
3—23, Gefle.



La Nova Testamento.

Nya Testamentet på Esperanto.

Inb. i klotband med förgyllt snitt
2: — kr. portofritt.

La Esperos red. 3—23, Gefle.

FYRVÄPPLINGEN,

organ för Excelsiorförbundet och andra
folkulturella rörelser, utkommer i
Skara en gång i månaden och kostar
endast 1 kr. för helt år.

Mot 60 öre i femöres frimärken er-
hålls tidningen (utom n:r 1 och 2) i
utgivarekorsband från exp., adress
endast **Skara**.

Aktuella programpunkter äro folk-
hälsans främjande och djurskydd.

Esperantoavdelning, redigerad av den
kände Esperantoentusiasten direktör
G. H. Backman, Hälsingborg. F. n.
pågår en lättfattlig Esperantokurs för
nybörjare. Litterära pristävlingar. F. n.
med ett bibliotek, värt 50 kr., som pris.

Fyrväplingen är en tidning för ung-
dom och ungdomsvänner

Vördsamt
Redaktionen.

PROVU LA KOPIOKRAJONON
ESPERANTO!

3: — kr. por dekduo. 30 oeroj por unu.

W. WAHLUND, GEFLE

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

Kort Lärobok i Esperanto

för nybörjare av

ALBIN ZACHRISSON

Läroverksadjunkt, Karlstad.

Rekvireras pr kontant hos förf., Karlstad.

☛ **PRIS 75 ÖRE.** ☛



N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 700 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.

Argenta medalo en Stockholm 1897
, , , Gefle 1901
, , , Norrköping 1906

La Espero

utgives av Gefle Esperanto-
förening och utkommer i
slutet av varje månad.

Lösnummerpris 10 öre.
Prenumerationspris Kr.
1: 20.

Prenumeration kan ske
dels direkt hos tidningens
expedition, genom återför-
säljare eller på posten.

Återförsäljare önskas på
varje plats! Provision om
flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare er-
hålla 20 öre för varje anskaf-
fad prenumerant, om minst 5
prenumerationsavgifter in-
sändas samtidigt.

Redaktion och expedition:
3—23, Gefle.

Abonprezo ekster Svedujo
1:00 Spesmilo. (12 numeroj).
Specimeno kontraŭ re-
spondkupono. Mendo ĉe
R. Pehrsson, 3—23, Gefle.

Ozarowsky & Pehrssons Bleck- & Plåtslageri

NORRA KOPPARSLAGAREGATAN 15 - GEFLE



TELEFON 188

